



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Paŝoj al plena posedo

la perfektiga
legolibro de
William Auld

Prezo 9,10 GM

=====

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pidel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 2/1975 - 13 jan 1975

Aperas ĉiusemajne

Estrara kunsido de UEA

Rotterdam (uea/pp) En la semajnfino de la 11a kaj la 12a de januaro 1975, en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, okazis la kutima vintra kunsido de la Estraro de UEA. Temis pri kunsido, kiun oni en la pasinteco ofte nomis "teknika" pro la fakto, ke ĝi malofte kunvenigis ĉiujn estraranojn, kaj ofte ne havis eĉ kvorumon. Ĉi tiun fojon, la Estraro kunvenis en sia plena konsisto, en la ĉeesto de ĉiuj ok estraranoj, direktoro kaj vicdirektoro de la CO. La prioritron de definitaj eroj el la escepte ampleksa tagordo (125 eroj) ĉeestis ankaŭ la librotenisto de la CO kaj s-ro U.J. Moritz, la gvidanto de la Komisiono pri la Statuto de UEA. En tiuj du tagoj, la Estraro efektive kunsidis dum 21 horoj, sed, ĉar preskaŭ ĉiuj estraranoj loĝis en la sama apuda hoteleto, la diskutoj daŭris ankoraŭ longe post la forlaso de la salono de la Biblioteko Hodler, kiu servis kiel kunsidejo.

Kiel atendeble, plej grandan parton de la kunsida tempo foruzis la traktado de la kompleksa financa problemaro de UEA. Plurajn horojn oni dediĉis al klopodoj ekvilibrigi la buĝeton por la jaro 1975 kaj oni daŭrigos tiujn klopodojn ankaŭ dum la aprila estrarkunsido. Kvankam la CO ankoraŭ ne povis liveri al la Estraro definitivajn kontosaldojn por la jaro 1974, oni ne havas grandajn spezarojn, ke tiu jaro montriĝos malpli deficitita ol 1973. En tiu maro da financaj inkuboj, tamen, eblis noti du pozitivajn punktojn: Kvankam ankoraŭ restas pluraj malklaraĵoj, jam nun estas certe, ke la 58a UK en Beograd finiĝis kun granda financa profito; la bilanco de la 59a UK en Hamburgo estas tute preta kaj montras kompletan ekvilibron de la spezoj. Se jam temas pri la kongresoj, la Estraro faris la decidon, ke la 61a UK en 1976 okazu en Ateno, dum por la jaro 1977 principe estas akceptita la invito de la islanda ĉefurbo Reykjavik. Diskutante la programon de la 60a UK en Kopenhago, la Estraro interkonsentis, ke la ĉeftemo de la Kongreso ligu al la Internacia Jaro de la Virinoj, kaj en aparta kunveno oni traktu la rolon de la individuo en la Esperanto-movado.

La neceso renovigi la Statuton de la Asocio antaŭ la 26a de aprilo 1976 intense laborigis la komitatan Komisionon pri la Statuto. Ankaŭ la Estraro dediĉis al tiu temo preskaŭ du horojn, sed revenos al ĝi ankaŭ en la aprila kunsido kaj diskutigos ĝin en la sekvanta kunsido de la Komitato samkiel inter la membraro de la Asocio.

Apartan lokon en la januara kunsido de la Estraro okupis la administraj problemoj kaj klopodoj malŝarĝi la Centran Oficejon, kiu fine de januaro 1975 restos kun 7 1/4 da tuttagaj oficistoj, kompare kun 11 en 1973 kaj 10 1/2 en 1974. Ĉar la nombro de la oficistoj draste reduktiĝis, dum la taskoj plenumataj de la CO apenaŭ malkreskis, oni povas atendi pliajn raciigojn de la laboroj kun la celo, ke oni certigu kontinuecon en la ĉefaj taskoj kaj laboroj de la Asocio.

S.Swistak

Estrarano pri informado

Vergelijk eens

Voor meer gegevens hierover verwijzen wij u naar het hoofdartikel en het cardietje op de voorpagina van dit nummer.

TAAL	LANGUE	LINGVO
Onregelmatig	Onregelmatig	Regelmatig
ik ben	je suis	mi estas
hij is	il est	li estas
zij is	elle est	ŝi estas
wij zijn	nous sommes	ni estas
u bent	vous êtes	vi estas
zij zijn	ils sont	ili estas
koning - koningin	roi - reine	rego - regino
zanger - zangeres	chanteur - chanteuse	kantisto - kantistino
kapper - kapster	coiffeur - coiffeuse	frizisto - frizistino
artist - artiste	artiste - artiste	artisto - artistino
Deen - Deense	Danois - Danoise	dano - danino
som - tante	oncle - tante	onkio - onkino
	Nog 22 weken, dan....	

Paŝo al gazetara kurso
lanĉita

Arnhem. Post unujara plurfoja kontaktado de Arnhema Esperanto-Komitato, Arnhem, Nederlando, kun la redakcio de "Arnhemse Koerier" (semaĵna senpaga gazeto) por eventuala kurso, la gazeto aperigis, je la 1975-01-09, en sia frontpaĝo la ĉefartikolon "Post la somera ferisezono: Arnhemse Koerier instruos al vi la mondan lingvon Esperanto!" kaj same frontpaĝe artikolon de konstanta rubrikisto pri la lingva problemaro kaj en la dua paĝo kompartabelon kun titolo "Foje komparu" preparitan de Arnhema Esperanto-Komitato por

ebligi al la legantoj kompari la de si plej konatajn 4 naciajn lingvojn (la nederlandan, anglan, francan kaj germanan) kun "regula lingvo". (Vidu supre!)

La samajn artikolojn kaj kompartabelon aperigis samdate kaj samaranĝe ankaŭ la frataj gazetoj "Zutphense Koerier" kaj "Regio", kion kun entuziasmo iniciatis la eldonejo mem de la tri gazetoj.

Ĉiusemaje aperados en la tri gazetoj kompartabelo preparita de Arnhema Esperanto-Komitato ĝis meze de junio, kiel preludo. Se sufiĉa nombro da interesitoj enskribiĝos, la vera gazetara Esperanto-kurso - laŭ la nuna plano - komenciĝos en aŭgusto kaj finiĝos en la venontjara februaro. Dum la gazetara kurso okazos kunvenoj de kursanoj en diversaj lokoj por buŝa ekzercado.

La tri gazetoj estas distribuataj en du nederlandaj provincoj. Iliaj eldonkvantoj estas kune 211 500 ekzempleroj.

E. J. Woessink, sekretario de
Arnhema Esperanto-Komitato
Onder de Beumkes 29
NL-6200 V e l p

Unua Esperanto-Foiro Turisma

Bydgoszcz. En Bydgoszcz de la 22 - 24 nov 1974 okazis la Unua Turisma Esperanto-Foiro, kiun partoprenis reprezentantoj de landaj Esperanto-Asocioj el Bulgario, GDR, Hungario, Slovakio kaj Pollando. Ĉeestis ankaŭ estraranoj de UEA, S. Swistak kaj de Monda Turismo, A. Grzebowski, N. Nikolov, E. Pallos, kaj de Turisma Servo de TEJO, W. Newak. La Foiro aranĝis Buroo de Eksterlanda Turismo por Junularo "Juventur", kiu de kelkaj jaroj utiligas Esperanton en sia agado. En 1972 oni interŝanĝis pli ol 500 esperantistoj-turistoj, en 1973 pli ol 750 kaj en 1974 pli ol 1500 - nur el Pollando forvojaĝis 56 Esperanto-grupoj.

Dum la unua tago oni prezentis ofertojn pri la Esperanto-aranĝoj en 1975. Rezulte de tio okazis duflankaj interparoloj kaj fine de la dua foira tago estis subskribitaj jenaj dokumentoj en Esperanto pri la E-interŝanĝo:

- Interkonsento pri interŝanĝo por 1975-1977 inter Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio kaj "Juventur" kun du jarprotokoloj por 1975 kaj kun unu anekso;
- Interkonsento pri interŝanĝo de E - grupoj por 1975 inter Distrikta Komitato de Bulgara Esperantista Asocio en Smoljan kaj "Juventur" kun 5 aneksoj;
- Interkonsento pri interŝanĝo de E - grupoj por 1975 inter Asocio de esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko kaj "Juventur" kun kvar aneksoj;
- Interkonsentoj inter BTK de HEA kaj DK de BEA kaj AE SSR.

La dokumentoj ebligis en 1975 al pli ol 2000 esperantistoj partoprenon en 1975 en internaciaj E-aranĝoj de la koncernaj landoj. Oni esprimis bedaŭron, ke nur en kvar landoj oni sukcesas realigi profesion E-turisman, kvankam estis invinitaj E-organizaĵoj ĉiuj al tiu-ĉi agado.

La plej grava decido de la Foiro estis funkciigo de la internacia buslinio "ESPERANTO" de 21.5. - 3.10.1975. Ĉiumerkrede startos busoj el Bydgoszcz por 10tagaj E-ekskursoj al Budapeŝto kaj dum julio kaj aŭgusto por 17-tagaj E-ekskursoj al Sofio, Plovdiv, Pisania. Julie kaj aŭguste oni povos aliĝi ankaŭ al 13-tagaj E-ekskursoj al Bulgario el Budapeŝto, starto ĉiuvendrede. Aliĝi povas esperantisto el ĉiuj landoj, ĉu ĉ "Juventur" en Bydgoszcz, str. Jagiellonska 12, Pollando, ĉu ĉe BTK de HEA en Budapest, str. Kesyermező u. 6, Hungario. La buslinion "Esperanto" priservas du komfortaj busoj "Ludoviko Zamenhof" kaj "Antoni Grabowski"

Dum la Foiro oni prilaboris Turisman Kalendaron 1975, kiu baldaŭ aperos. Oni povos ĝin ricevi kontraŭ rpk skribante al Klubo "Esperanto", str. M. Curis-Sklodowskiej 10/4, PL-85-094 Bydgoszcz. Okazis ankaŭ trarigardo de lumbildoj "Esperanto-Somero 74", kiun aranĝis la Klubo "ESPERANTO" en Bydgoszcz.

Tre valora estis renkontiĝo de la E-delegitoj kun 100 delegitoj de la Tria Vojevodia Kunveno de Delegitoj de Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz, kiuj reprezentis 1585 membrojn de PEA el vojevodio de Bydgoszcz agantaj en 30 E-Rondoj.

La Foiro fermis Internacia Esperanto-Balo dum kiu ludis kaj kantis tre sukcese du novaj E-ensembloj "KRAJANOJ" el Spólno kaj "Ni-74" el Inowroclaw.

Okaze de la Foiro estis organizita ekspozicio en Antikvarejo de Bydgoszcz "35 jaroj de Esperanto-gazetaro" kaj aperis speciala katalogo de la ekspozicio.

La E-aranĝoj estis tre sukcesaj kaj grave helpis al disvolvo de profesia Esperanto-turismo.

mgr Andrzej Grebowski

Adalbert Masuhr en Novzelando

Adalbert Masuhr nuntempe restadas en Novzelando kaj prelegis dum la 40a Kongreso de Esperanto de la Novzelandaj esperantistoj, kiu okazis de la 4 - 8 jan 75 en Christchurch, pri FRG kaj Afriko. "Oni povas ege bone vivi en Novzelando", skribis A. Masuhr.

Informkunveno en Munkeno

Munkeno (pp) Lunde, la 20an de januaro 1975, okazos informkunveno pri Esperanto por interesuloj de Munkeno, je la 18a horo, en Ausstellungsraum, Holzkirchner Bahnhof,, Enirejo Bayerstr.

OStR Ludwig Thalmeier faros enkondukan prelegon kaj provlecionon kun lumbildoj. Libroservo Pickel Nürnberg ekspozicios E-librojn.

En la sama ejo la Grupo Munkeno kunvenadas ĉiun lundon, vespere. Eksterlandaj gastoj estas ĉiam bonvenaj!

Esperanto en la Radio

Radio Varsovio ricevis dum 1974 pli ol 3000 leterojn kaj kartojn. Fakte tian nombron la redakcio antaŭ du - tri monatoj ne supozis, supozeble sub la impreso de la relative malbona rezulto de la konkurso okaze de la 15a datreveno de la E-redakcio. Tamen dum la lastaj dum monatoj de la pasintaj jaroj afluis ankoraŭ sufiĉe multaj korespondaĵoj. Por la Esperanto-redakcioj multaj korespondaĵoj estas vivonecesa, ĉar fakte ili estas la mezurilo, laŭ kiu la respondeculoj de la radio-stacio taksas la rezulton de la elsendoj. Pro tio Pilo-Press denove apelacias al ĉiuj kiuj aŭskultas al E-elsendoj, nepre skribi al la stacioj: Varsovio, Berno, Vieno, Zagrebo, Romo, Pekino ktp. - La gvidan pozicion en la vico de korespondaĵoj dum novembro kaj decembro tenis Finnlando, el kiu sole unu aŭskultanto skribis dum unu monato pli 40 korespondaĵoj. En la aktuala raportado de Varsovio dum la pasintaj tagoj elstaris la informoj kaj komentoj pri la vizito de Edward Gierek sur Kubo kaj la Jartrideko pri la liberigo de Pollando. Oni povis kelkfoje aŭdi felietonojn pri Varsovio kaj raporton pri ekspozicio en Varsovio, kiun jam vizitis pli ol 800 000 homoj.

Radio Vieno, kiel kutime, la 11/12 jan, elradiis la semajnan komenton de d-ro Alfred Macher, kiun prezentis d-ro Kalr Beckmann kaj Emil Vokal. Jen kelkaj citaĵoj:

"Validas nun en Aŭstrio, leĝe, la 40-hora laborsemajno. Pli a laboro pagendas laŭ ekstralaborhora tarifo. Kompare al aliaj landoj certe grandioza sociala progreso! Sed ĉiu progreso alportas siajn problemojn - ankaŭ en Aŭstrio.

Kvankam la leĝo klare malpermesas, ke la kvardekhora laboro estu farata en nur kvar tagoj po dek horoj, kelkaj grupoj de dungitoj postulas tian koncentrigon de la labortempo, por ke ili havu agrable longan, tritagan semajnfino..."

En la disaŭdigo de la 18a kaj 19a de januaro Radio Vieno prezentos artikolon pri Rosa Albach-Retty, originale verkitan de d-ro Karl Beckmann. Jen la komencaj frazoj: "Atingi, eble eĉ transpasi la centan vivojaron, al tio ordinara homo apenaŭ iam serioze esperas. Centa naskiĝtago signifas sensacion ne nur por familio kaj ĉirkaŭaĵo - alvenas gratulante kun honorigaj donacoj eĉ altrangaj funkciuloj. Raportas pri ĝi la loakj gazetoj - ankaŭ se la jubeleanto travivis sian jarcenton senbrile, sen iu elstara merito..."

Ankaŭ Berno kaj Romo raportis pri ekonomiaj-politikaj aferoj: Dr. A. Baur parolis pri la ekonomiaj kaj politikaj perspektivoj de Svislando kaj Romo raportis pri la evoluo de la strikorajto en Italio.

Citaĵo: "Mi kore dankas pro Pilo-Press, ĉiam aktuala kaj riĉa fonto de informoj, kaj por la aliaj publikaĵoj de vi prizorgataj, antaŭ ĉio la interesa Germana Esperanto-Revuo (aŭ Eŭropa E-Revuo, kiel vi nomos ĝin ekde nun)...d-ro Antonio De Salvo"